

GRAMSCI KAJ ESPERANTO

Kion oni scias kaj kion oni devas scii



GRAMSCI E L'ESPERANTO

Quello che si sa e quello che si deve sapere

GRAMSCI KAJ ESPERANTO

Kion oni scias kaj kion oni devas scii

GRAMSCI E L'ESPERANTO

Quello che si sa e quello che si deve sapere

enkonduko de / introduzione di
Carlo Minnaja

eldono de / a cura di
Andrea Montagner

Milano 2009

 ARCIPELAGO EDIZIONI

Pubblicato in occasione dell'82° Congresso della SAT
Milano 18-25 luglio 2009

Eldonita okaze de la 82a SAT Kongreso,
Milano 18-25 julio 2009

Si ringrazia Andrea Jachia per aver concesso l'utilizzo delle
immagini inserite nel volume e in copertina relative ad Angelo
Filippetti.

Si ringrazia inoltre Aldo Grassini per il contributo che ha reso
possibile la pubblicazione del presente volume.

La biografia di Angelo Filippetti è stata tratta dal *Dizionario
Biografico degli Italiani*, Vol. 47, "Ferrero-Filonardi", 1997,
Roma, Istituto della Enciclopedia Italiana, che ringraziamo per la
cortese concessione.

Le traduzioni sono di Antonio De Salvo e Filippo Franceschi

2009 Arcipelago Edizioni
Via Carlo D'Adda 21
20143 Milano
info@arcipelagoedizioni.com
www.arcipelagoedizioni.com

Prima edizione luglio 2009
ISBN 978-88-7695-409-2

Tutti i diritti riservati

Ristampe:

6	5	4	3	2	1	0
2014	2013	2012	2011	2010	2009	

INDICE

Bonveniga Mesaĝo	8
Messaggio di Benvenuto	9
<i>Enkonduko</i>	12
<i>Introduzione</i>	13
<i>Antaŭparolo</i>	34
<i>Prefazione</i>	35
<i>Gramsci kaj Esperanto</i>	40
<i>Gramsci e l'Esperanto</i>	41
Kontraŭ Antaŭjuĝo	44
Contro un pregiudizio	45
Komentarias la redakcio	48
Commenta la redazione	49
Milito esperantista	54
Guerra esperantista	55
Ankoraŭ Esperanto	58
Ancora l'Esperanto	59
Letero de Gramsci al <i>Avanti</i>	60
Lettera di Gramsci all' <i>Avanti</i>	61

Respondo de la Direktoro de <i>Avanti</i>	64
Risposta del Direttore dell' <i>Avanti</i>	65
Ankoraŭ pri Esperanto	70
Ancora l'Esperanto	71
La unika lingvo kaj Esperanto	78
La lingua unica e l'Esperanto	79
 Note Biografiche / Biografiaj notoj.	 95
ANGELO FILIPPETTI	96
RUGGERO PANEBIANCO	106
GIACINTO MENOTTI SERRATI	110

BONVENIGA MESAĜO AL PARTOPRENANTOJ
AL 82A SAT KONGRESO
MILANO 18-25 JULIO 2009

MESSAGGIO DI BENVENUTO AI PARTECIPANTI
DELL'82° CONGRESSO DEL SAT
Milano 18-25 luglio 2009

ARCI ESPERANTO bonvenigas la partoprenantojn en la 82-a Kongreso de SAT kun titolo “Elmigri sen landlimoj, vivi sennaciece”.

Mi venis al Milano junaĝe, de Venetio, kaj mi havis neniun problemon por veni, kaj mi ĉiam pensis, ke antaŭ kelkaj jarcentoj eble mi ne estus povinta, ĉar norda Italujo, sed ne nur ĝi, estis dividita en “naciajn” ŝtatojn.

Ankoraŭ hodiaŭ la “heredantoj” de tiuj “ŝtatoj” depostulas senton de aparteno rilate iun nacian Ŝtaton, Italujon, en kies landlimoj multaj aliaj popoloj, kun tre pli malnovaj historioj, depostulas senton de aparteno kaj peton pri respekto.

Jen la socia-historia kunteksto, en kiun eniĝas ankoraŭ hodiaŭ la eseoj kaj la artikoloj, kiujn ni prezentas en formo de libreto kaj memore al ĉi tiu kongreso, en la itala kaj en esperanto: Italujo estis farita, sed oni bezonis fari la italojn, kaj ankaŭ famkonata intelektuko kia Antonio Gramsci estas influata de ĉi tiu pens-fadeno malakceptante la hipotezon pri iu lingvo internacia, kompare kun la pliprofundigo kaj la studo de la “naciaj” lingvoj.

Malmultajn jarojn post ĉi tiu debato naskiĝis SAT, kiel rezulto de grupiĝo de tiuj esperantistoj kiuj estus volontaj, samkiel ili ankoraŭ volas, elirigi esperanton el neŭtraleca asocia medio por fari per ĝi “klasan” uzon, nome rimedon de emancipiĝo de la pli malriĉaj klasoj.

Ankaŭ en ĉi tiu Eŭropo, kvankam sen naciaj landlimoj, la nacioj ne mortis, sed ili firmiĝas pere de la naciaj

L'ARCI ESPERANTO dà il BENVENUTO ai partecipanti all'82° Congresso della SAT dal titolo "Emigrare senza confini, vivere senza nazione".

Sono venuto giovane a Milano, dal Veneto, e non ho avuto alcun problema a venire e ho sempre pensato che qualche secolo fa forse non avrei potuto perchè l'Italia settentrionale, ma non solo, era divisa in stati "nazionali".

Ancora oggi gli "eredi" di quegli "stati" rivendicano un senso di appartenenza rispetto ad uno Stato nazionale, l'Italia, nei cui confini molti altri popoli, con storie molto più antiche, rivendicano un senso di appartenenza e una richiesta di rispetto.

È questo il contesto storico-sociale in cui si inseriscono ancora oggi i saggi e gli articoli che ripresentiamo in forma di pamphlet e a ricordo di questo congresso, in italiano e in esperanto: l'Italia era fatta ma bisognava fare gli italiani e anche un intellettuale di chiara fama come Antonio Gramsci viene influenzato da questo filone di pensiero nel respingere l'ipotesi di una lingua internazionale, rispetto all'approfondimento e allo studio delle lingue "nazionali".

Pochi anni dopo questo dibattito nasceva la SAT come risultato di un'aggregazione fra quegli esperantisti che avrebbero voluto, come vogliono ancora, far uscire l'esperanto da un ambito associativo neutralista per farne un uso "di classe", cioè strumento di emancipazione delle classi più povere.

interesoj kiuj kunpuŝiĝas en eŭropa sidejo, kaj en ĉi tiu kunteksto iu sennacia asocio bezonas ne tiom renovigi sian ideologian-asocian fundamenton, kiom sian vizitkarton direkte al tiuj, kiuj povus trovi kaj en esperanto kaj en SAT sian propran hejmon.

Ankoraŭ hodiaŭ estas tiuj malfortaj tavoloj de la loĝantaro, tiuj laboristoj italaj aŭ germanaj, ĉinaj aŭ afrikaj, kiuj trasuferas la povludojn de la granda kapitalo, kaj kiuj ankoraŭ hodiaŭ povus esti reprezentataj de iu SAT, kiuj reprezentu la HOMAN INTERESON en MONDO SEN LANDLIMOJ.

Kun ĉi tiu penso iras niaj plej bonaj bondeziroj de bona laboro al la partoprenantoj en la 82-a Kongreso de SAT, kaj ke ĉi tiuj malmultaj vortoj povu ĝermi en la koro kaj en la ĉiutagaj faroj de ĉiu el ni.

Andrea Montagner

Arci Esperanto

Anche in questa Europa, pur senza confini nazionali, le nazioni non sono morte ma si affermano attraverso gli interessi nazionali che entrano in contrasto in sede europea e in questo contesto una associazione a-nazionale ha bisogno non tanto di rinnovare il proprio fondamento ideologico-associativo, quanto il proprio biglietto da visita verso chi potrebbe trovare e nell'esperanto e nella SAT la propria casa.

Ancora oggi sono quegli strati deboli della popolazione, quegli operai italiani o tedeschi, cinesi o africani, che subiscono i giochi di potere del grande capitale e che ancora oggi potrebbero essere rappresentati da una SAT che rappresenti l'INTERESSE UMANO in un MONDO SENZA FRONTIERE.

Con questo pensiero vanno i nostri migliori auguri di buon lavoro ai partecipanti all'82° Congresso della SAT e che queste poche parole possano germogliare nel cuore e nelle azioni quotidiane di ognuno di noi.

Andrea Montagner
Arci Esperanto

CARLO MINNAJA

Enkonduko

ESPERANTO INTER LA LABORISTOJ
ĜIS LA UNUA POSTMILITA PERIODO

La ideo de universala lingvo entuziasmigis klerulojn kaj filozofojn dum multaj jarcentoj. La laŭgrada estingiĝo de la latino kiel lingvo inter kleruloj kaj sciencistoj inspiris multnombrajn iniciatojn pri kreo de artefaritaj planingvoj, da kiuj aperis proksimume deko por ĉiu jarcento ekde la dekseca jarcento por alveni al eksplodo en la deknaua, dum kiu estis proponita kvindeko. La unua teksto en Esperanto, per kiu Lazaro Ludoviko Zamenhof lanĉis la lingvon en 1887, estis skribita en la rusa; tuj sekvis eldonoj en la pola, franca, germana kaj, la postan jaron, en la angla. La unuaj adeptoj de Esperanto apartenis do al la klasoj kleraj de la rusa imperio, al kiuj aldoniĝis baldaŭ intelektuloj de centra Eŭropo; ene de malmultaj jaroj estis kreiĝintaj esperantistaj grupoj en Germanio, Francio, Svislando, Britio. La socia klasado de interesatoj pri ideo de monda lingvo

CARLO MINNAJA

Introduzione

L'ESPERANTO TRA I LAVORATORI
FINO AL PRIMO DOPOGUERRA

L'idea di una lingua universale ha appassionato intellettuali e filosofi per molti secoli. Il progressivo estinguersi del latino come lingua tra dotti e scienziati ha ispirato numerose iniziative di creazione di lingue artificiali che sono comparse circa una decina per ogni secolo a partire dal Cinquecento per giungere ad una esplosione nell'Ottocento, in cui ne sono state proposte una cinquantina. Il primo testo di esperanto, con cui Lazzaro Zamenhof lanciò la lingua nel 1887, era scritto in russo; immediatamente seguirono edizioni in polacco, francese, e tedesco e, l'anno successivo, in inglese. I primi adepti dell'esperanto appartennero quindi a classi colte dell'impero russo, a cui si aggiunsero presto intellettuali dell'Europa centrale; nell'arco di pochi anni si erano già creati gruppi esperantisti in Germania, Francia, Svizzera, Gran Bretagna.. La classificazione sociale degli interessati all'idea di una lingua mondiale raccoglieva filosofi e poliglotti, che vedevano in una

kolektis filozofojn kaj poliglotojn, kiuj vidis en monda lingvo, kaj specife en Esperanto kiel ĝia praktika realigo, taŭgan ilon por sia idealo de universaleco.

Ne disigita de la universala lingvo, eĉ, male, preskaŭ ĝia fono, estis iu religia idealo de frateco kiu interesis nature mediojn katolikajn kaj ĝenerale kristanajn, oriente samkiel okcidente. Sed la laboristaj amasoj restis, dum plena dekkvino da jaroj, tute for de ĉi tiu nova idealeco. La moto “Proletoj de la tuta mondo, unuiĝu!” restis dum sufiĉe longa tempo neglektata en sia lingva aspekto. Aldoniĝis ankaŭ la dubo, ĉu la lingvo estas stabila: la strebo al daŭra plibonigo estas la malbono, kiu malebligis al aliaj universalaj lingvoj akceptiĝon. Se iu intelektulo esperas plibonigi la lingvan instrumenton, kiun li ŝatas, tamen malfacile tuta grupo de adeptoj emas ŝanĝi la ilon akiritan kaj pri kies funkciado ili jam estas plene konvinkitaj el propra sperto. La vento de la reformoj trairis ankaŭ Esepranton en du okazoj: en 1894 Zamenhof mem, kolektinte diversajn proponojn pri modifoj en la lingvo, ilin voĉdonigis tra la periodaĵo *La Esperantisto*, ununura Esperanto-revuo ekzistanta, kiu funkciis kiel informilo kaj disvastigilo kaj ankaŭ kiel ekzercejo kaj lingva diskutejo. La ŝanĝoj voĉdonigitaj estis ĉiuj malaprobataj kaj la lingvo aliris do stabilecon, fortigitan de la ĉiam pli alta nombro de beletraĵ tekstoj kiuj laŭgrade

lingua mondiale, e specificamente nell'esperanto come sua realizzazione pratica, un mezzo adeguato al loro ideale di universalità.

Non disgiunto dalla lingua universale, anzi, quasi un suo sottofondo, era un ideale religioso di fratellanza che interessò naturalmente ambienti cattolici e genericamente cristiani, a est come a ovest. Ma le masse dei lavoratori rimasero, per una buona quindicina di anni, totalmente estranee a questa nuova idealità. Il motto "Proletari di tutto il mondo, unitevi!" restò per parecchio tempo trascurato nel suo aspetto linguistico. Si aggiungeva anche il dubbio che la lingua fosse stabile: la tendenza al miglioramento continuo fu il difetto che aveva impedito ad altre lingue universali di affermarsi. Se qualche intellettuale ha la speranza di migliorare lo strumento linguistico di cui è appassionato, difficilmente interi gruppi di adepti hanno voglia di cambiare lo strumento che hanno acquisito e del cui funzionamento sono oramai pienamente convinti per averlo sperimentato. La ventata delle riforme attraversò anche l'esperanto in due occasioni: nel 1894 Zamenhof stesso, avendo raccolto varie proposte di modifica della lingua le pose in votazione attraverso il periodico *La Esperantisto*, unica rivista di esperanto esistente che funzionava come strumento di informazione e di diffusione ed anche come palestra di esercitazione e discussione linguistica. Le modifiche poste in votazione furono tutte respinte e la lingua si avviò quindi ad una stabilità, rafforzata dal sempre maggior numero di testi letterari che

aperadis. Dua reforma ondo estis en la periodo 1907-1908, kiam estis la iluzio, ke iu Delegitaro de sciencistoj povos disvastigi la lingvon en akademia medio. La Delegitaro, vaste apogata de la esperantistoj ĉe la komenco, elektis poste lingvon forte bazitan sur Esperanto, sed kiu deiĝis de ĝi en kelkaj trajtoj esencaj kaj de la gramatiko kaj de la vortaro. La esperantista popolo, escepte de eta malplimulto, rifuzis aliĝon al tiu ĉi nova lingvo kun reguloj truditaj de komisiono de fakuloj: Esperanto evoluos kiel etna lingvo, malrapide, pere de neologismoj kiuj, tra natura evoluo, arkaikigos formojn malpli taŭgajn. Jam en 1905, per la akcepto de tri libroj kiel fundamento de la lingvo, ĉi tiu estis liberigita de reformoj deciditaj de supre, kaj do ni povas konsideri, ke 1905 estis la unua jaro ekde kiam ĉiu reformpropono blokiĝos dekomence.

La laboristoj partoprenis la socian vivon kutime grupigitaj en apartaj asocioj; do la unuaj kleruloj adeptoj de Esperanto klopodis interesi laboristajn asociojn. Jam en 1903-1905 estis kreitaj la unuaj grupoj de esperanistaj laboristoj: temis pri laboristoj kun nealta kultura nivelo, ofte konantoj sufiĉe proksimumaj eĉ de propra nacia lingvo. La unuaj grupoj estis en Hago, Hamburgo, Munkeno, Parizo. En Britio naskiĝis en 1907 Brita Ligo de Socialistoj Esperantistoj, kaj aperis ankaŭ naciaj revuoj en Nederlando, Ĉeĥoslovakio, Francio. Marcel Verama

andavano man mano comparendo. Una seconda ondata di riforme fu nel periodo 1907-1908, quando vi fu l'illusione che una Delegazione di scienziati avrebbe potuto diffondere la lingua in un ambiente accademico. La Delegazione, largamente appoggiata dagli esperantisti all'inizio, scelse poi una lingua fortemente basata sull'esperanto, ma che se ne discostava in alcuni tratti essenziali sia della grammatica che del lessico. Il popolo esperantista, salvo una piccola minoranza, rifiutò di aderire a questa nuova lingua, con regole imposte da una commissione di esperti: l'esperanto si sarebbe evoluto come una lingua etnica, lentamente, tramite neologismi che avrebbero, con la naturale evoluzione, reso arcaismi forme meno buone. Infatti già nel 1905, con l'accettazione del gruppo di tre libri come fondamento della lingua, quest'ultima era stata svincolata da riforme decise dall'alto, e quindi possiamo considerare il 1905 come l'anno a partire dal quale qualsiasi proposta di riforma era bloccata sul nascere.

I lavoratori partecipavano alla vita sociale solitamente raggruppati in associazioni specifiche; pertanto i primi intellettuali adepti dell'esperanto cercarono di interessare associazioni di lavoratori. Già nel 1903-1905 si formarono i primi gruppi di lavoratori esperantisti: si trattava di lavoratori di basso livello culturale, spesso conoscitori assai approssimativi della loro stessa lingua materna. I primi gruppi si formarono a L'Aia, Amburgo, Monaco di Baviera, Parigi. In Inghilterra nacque nel 1907 una Lega Britannica dei Socialisti Esperantisti, e

(pseŭdonimo de Paul Berthelot, fondinto en 1905 de revuo *Esperanto*) estis en 1906 iniciatinto de revuo kiu ekaperis la postan jaron, *Internacia Socia Revuo*. En 1906 estis okazinta, dum la E-kongreso en Ĝenevo, eta maldekstrula kongreso, nomita poste en la historio *Ruĝula kongreseto*. Naskiĝis *Internacia Asocio Paco-Libereco*, kiu poste nomiĝos *Liberiga Stelo*, kun la celo kontraŭbatali militismon kaj kapitalismon, kaj disvastigi Esperanton inter socialistoj, pacifistoj, liberecanoj; sed la asocio neniam disvastiĝis konkrete ekster Francio. Ankaŭ en la sekvaj kongresoj okazis ĉiujare kunvenoj de maldekstruloj kun la titolo *Ruĝula kongreseto*. Intertempe kreiĝis en diversaj landoj de centra Eŭropo asocioj de laboristoj, kaj estis planita klopodo kolekti ĉi tiujn asociojn en ununuran internacian organizon. Tia unuiĝo estus devinta formaliĝi dum la kongreso en Parizo en 1914, kiu tamen ne povis okazi pro la eksplodo de la milito.

La laborista E-movado stagnis dum la milito. Efektiva organizo estis kreita en 1921, kiam franco Eugène Adam (1879-1947) klopodis starigi denove la kontaktojn kaj antaŭenigis revuon *Le travailleur espérantiste*, en kiu li verkis plurajn artikolojn sub la nomo *L'anti*; poste li mem alprenis la nomon Eŭgeno Lanti kaj estis la ĉefa organizanto de la *Sennacieca Asocio Tutmonda*. Tiu asocio do akcentis la kontraŭstaron al la koncepto de nacio pli ol la insiston pri la koncepto de laborista klaso.

uscirono anche delle riviste nazionali in Olanda, Cecoslovacchia, Francia. Marcel Verama (ps di Paul Berthelot, fondatore nel 1905 della rivista *Esperanto*) fu l'iniziatore nel 1906 di una rivista, prologo di una rivista che uscì l'anno successivo, *Internacia Socia Revuo* (Rivista Sociale Internazionale). Nel 1906 aveva avuto luogo, durante il congresso di esperanto a Ginevra, un piccolo congresso di sinistra, denominato poi nella storia *Ruĝula kongreseto* (Piccolo congresso dei rossi). Nacque una associazione internazionale di pace e libertà, *Internacia Asocio Paco-Libereco*, che poi si chiamerà *Liberriga Stelo* (Stella liberatrice), con lo scopo di combattere il militarismo, il capitalismo e di diffondere l'esperanto tra i socialisti, i pacifisti, i libertari; ma l'associazione non si diffuse mai significativamente al di fuori della Francia. Anche nei congressi successivi ci furono ogni anno riunioni di partecipanti di sinistra con il titolo "Piccolo congresso dei rossi". Nel frattempo si creavano in diverse nazioni dell'Europa centrale associazioni di lavoratori, e fu progettato un tentativo di raccolta di queste società in un'unica organizzazione internazionale. Tale unione avrebbe dovuto formalizzarsi durante il congresso di esperanto di Parigi nel 1914, che però non poté svolgersi per l'inizio del conflitto.

Il movimento esperantista dei lavoratori ebbe una fase stagnante durante la guerra. Una effettiva organizzazione fu creata nel 1921, quando il francese Eugène Adam (1879-1947) cercò di stabilire di nuovo i contatti e portò avanti la rivista *Le travailleur espérantiste* sulla

Liaj artikoloj estis poste kolektitaj en fasciklon sub la titolo “For la neŭtralismon!”, kiu iĝis kvazaŭ baza teksto por la nova organizaĵo.

La polemiko kun Gramsci enkadriĝas en momento kiam komenciĝis nova florado de la internaciisma movado en la tujpostmilita periodo,. La multnombra elmigrado, daŭranta jam de kelke da jardekoj, estis levinta la problemon de la lingvo kiel esencan problemon por faciligi la integriĝon de la laboristoj en la gastiganta lando. La milito, kun alternaj antaŭeniroj kaj retretoj de la armeoj, kun diversnaciaj soldatoj unu apud la alia, estis iginta eĉ pli evidenta la problemon de la interkonpreniĝo je popola nivelo. Startas de ĉi tie la propono de Vezio Cassinelli kaj la polemiko sekvinta la draste negativan respondon de Gramsci.

Aliaj legantoj respondis siavice. Aparte interesaj la konsideroj de Ruggero Panebianco, ĉar li evidentigis, kiel Esperanto povas esti bela ankaŭ estetike, eco preskaŭ apriorie malagnoskata ĉe lingvo artefarita. Li estis unu el la unuaj esperantistoj en Padova kaj estro de la loka grupo¹. Tiu ĉi grupo estis fondita en 1913 kaj ĝi iniciatis kursojn pri la internacia lingvo en pluraj lokoj de

¹ Pri la aktivado de Ruggero Panebianco (1848-1930) vidu C.Minnaja, *L'università di Padova e la lingua internazionale*, Quaderni per la storia dell'università di Padova, 40 (2007), p. 67-110.

quale scrisse vari articoli sotto il nome di *L'anti*; poi prese egli stesso il nome Eùgeno Lanti e fu il principale organizzatore della *Sennacieca Asocio Tutmonda* (SAT, Associazione Mondiale Anazionale). Tale associazione poneva quindi l'accento sulla contrarietà al concetto di nazione più che sul concetto di classe lavoratrice. I suoi articoli furono poi raccolti in un fascicolo sotto il titolo "Abbasso il neutralismo!" che diventò quasi un testo di base per la nuova organizzazione.

La polemica con Gramsci si inserisce in un momento in cui iniziava una nuova fioritura del movimento internazionalista che si ebbe nell'immediato dopoguerra. La vasta emigrazione che durava già da alcuni decenni aveva posto il problema della lingua come problema essenziale per facilitare un'integrazione del lavoratore nel paese ospitante. La guerra, con le alternanti avanzate e ritirate degli eserciti, con la presenza di soldati di varie nazioni a contatto gli uni con gli altri, aveva reso ancor più drammatico il problema della comprensione a livello di popolo. Di qui la proposta di Vezio Cassinelli e la polemica che seguì alla risposta drasticamente negativa di Gramsci.

Altri lettori risposero a loro volta. Di particolare interesse le considerazioni di Ruggero Panebianco, perché questi metteva in luce come anche l'esperanto potesse essere bello artisticamente, qualità quasi negata a priori nei confronti di una lingua nata a tavolino. Egli fu uno dei primi esperantisti di Padova e dirigente del gruppo

regiono Veneto, de Rovigo al Fossò, de Este al Legnago, Piazzola, Cittadella. Panebianco estis tiutempe jam konata profesoro pri mineralogio de la universitato de Padova, kaj plurajn sciencajn iniciatojn oni ŝuldas al li. Docento dum pli ol 40 jaroj en la padova universitato, en 1883 li estis stariginta la Mineralogian Muzeon kiel aŭtonoman institucion. Li fondis poste en 1888 la periodaĵon "Rivista di Mineralogia e Cristallografia Italiana", kiun li direktis ĝis 1918. En ĉi tiu revuo, en la periodo 1914-1916, ni trovas iujn artikolojn liajn en Esperanto, reeldonitajn poste kiel memstarajn broŝurojn de la Tipografia Kooperativo de Padova. Panebianco ĉiam dediĉis atenton al la lingvo kaj al la internacieco de la scienco: iu lia broŝuro pri la leĝo de Haüy, baza en kristalografio, havas antaŭparolon en lingvoj Esperanto, itala, angla, franca, kaj germana. En tiu antaŭparolo li mencias Lev Tolstoj kaj lian juĝon pri Esperanto kaj ĝia facileco. La artikolo estas krome interesa de la vidpunkto de la scienca terminologio, ĉar Panebianco estas kreinto de la kristalografia terminologio.

Panebianco estis socialista aktivulo jam ekde siaj junulaj jaroj. En 1893 li estis tradukinta, sub la titolo "La venonta socia revolucio", ĉapitron de la verko de William Morris "Lando neekzistanta", por la Milana eldonejo "Ufficio della lotta di classe" (Oficejo de la klasbatalo). Estas priskribita lando

locale¹. Questo gruppo era stato fondato nel 1913 ed era promotore di corsi di lingua internazionale in numerose località del Veneto, da Rovigo a Fossò, da Este a Legnago, Piazzola, Cittadella. Panebianco era all'epoca professore, già affermato, di mineralogia all'università di Padova, e numerose iniziative scientifiche si devono a lui. Docente per oltre quarant'anni nell'ateneo patavino, nel 1883 aveva costituito il Museo di Mineralogia come entità a sé stante. Fu poi fondatore nel 1888 della "Rivista di Mineralogia e Cristallografia Italiana", che diresse fino al 1918. In questa rivista, nel periodo 1914-1916, troviamo alcuni suoi articoli in esperanto, ripubblicati poi come opuscoli a sé stanti dalla Società Cooperativa Tipografica di Padova. Panebianco aveva sempre dedicato attenzione alla lingua e all'internazionalità della scienza: un suo fascicolo in esperanto sulla legge di Haüy, fondamentale in cristallografia, ha una prefazione in esperanto, italiano, inglese, francese e tedesco. In tale prefazione egli cita Leone Tolstoj e il suo giudizio sull'esperanto e la sua facilità. L'articolo è inoltre interessante dal punto di vista della terminologia scientifica, perché Panebianco è un creatore della terminologia cristallografica.

Panebianco era stato un militante socialista fin dai suoi anni giovanili. Nel 1893 aveva tradotto, sotto il titolo "La futura rivoluzione sociale", un capitolo del

¹ Sull'attività di Ruggero Panebianco (1848-1930) vd. C. MINNAJA, *L'università di Padova e la lingua internazionale*, Quaderni per la storia dell'università di Padova, 40 (2007), pp. 67-110.

sen estroj kaj sen leĝoj. La antaŭparolo estas kritika rilate al anarkiistoj, kies revolucio estas similigita al tiu burĝa, kaj ĝi finiĝas per la jenaj vortoj:

Nur la generacioj de la socialista Ŝtato – Ŝtato kiu, zorgante nur pri produktado kaj interŝanĝo de la varoj, estas la neo de la nuna – povos eble realigi tiun absolutan neadon de organizoj, eĉ socialistaj, kio por la momento estas revo, tre bela revo: tiu priskribita de Morris.

Eĉ se post 1918 Panebianco ne plu uzos Esperanton, sed la *latino sine flexione* de Peano, li estos ĉiam pacifisma socialisto kaj plena apoganto de la utileco de internacia planlingvo. En 1921 li eldonas broŝuron, *Adoptione de lingua internationale es signo que evanesce contentione de classe et bello*: en ĝi li esprimas la koncepton ke adopto de internacia lingvo povas elimini la klaskonfliktojn kaj la militon. Tiuteme li estis proksima al la ideologio de Zamehof, kiu en sia alvoko al la diplomatoj titolita “Post la granda milito”, publikigita en la revuo *The British Esperantist* fine de 1915, kiam oni supozis, ke la milito estas finiĝonta, forte akcentis la lingvan demandon, proponante, ekzemple, ke lando ne havu nomon el iu popolo sed el sia ĉefurbo.

libro di William Morris "Un paese che non esiste", per i tipi dell'editrice "Ufficio della lotta di classe", Milano. Viene descritto un paese senza capi e senza leggi. La prefazione ha una critica nei confronti degli anarchici, la cui rivoluzione viene assimilata a quella borghese, e termina con queste parole:

Soltanto le generazioni dello Stato socialista – Stato che, occupandosi solamente della produzione e dello scambio dei beni, è la negazione di quello attuale – potranno forse realizzare quella negazione assoluta di organizzazioni, anche socialiste, che per ora è un sogno, un bellissimo sogno: quello descritto dal Morris.

Anche se dopo il 1918 Panebianco non userà più l'esperanto, ma il *latino sine flexione* di Peano, sarà sempre un socialista pacifista e un convinto assertore dell'utilità di una lingua internazionale pianificata. Nel 1921 pubblica un opuscolo, *Adoptione de lingua internationale es signo que evanesce contentione de classe et bello*: in esso esprime il concetto che l'adozione di una lingua internazionale possa eliminare i conflitti di classe e la guerra. Era in questo vicino alla ideologia di Zamenhof, che nel suo appello ai diplomatici intitolato *Dopo la grande guerra*, pubblicato sulla rivista *The British Esperantist* alla fine del 1915, quando si pensava che la guerra stesse per finire, dava molto risalto alla questione linguistica, proponendo ad esempio che un paese non traesse il suo nome da un popolo ma dal nome della capitale.

Juĝon pozitivan pri la ebleco, ke lingvo internacia povas favori la pacon kaj la reciprokan interkonon inter la popoloj estis esprimita en 1914 ankaŭ de Roberto Ardigò, profesoro pri filozofio en Padova de 1881 ĝis 1920, en letero al la Padova esperantista grupo, kiu estis petinta lian opinion pri la utileco de internacia lingvo.

Milano estis en tiuj jaroj aparte favora al Esperanto: la loka grupo estis fondita jam en decembro 1906 kun la titolo “Milana grupo pro Esperanto”; ĝi propagandis la lingvon kaj starigis kursojn, kaj la unua leciono ĉe la Filologia rondo havis 900 ĉeestantojn. En 1911 naskiĝis en Milano la “Esperantista konsulejo por la italaj universitatoj”, fondita de studento Pier Carlo Monti el Pavia, kun la kunlaboro de fratoj Pietro kaj Rinaldo Padulli el Milano kaj Aldo Schmucker el Ĝenovo. En 1913 la du grupoj kunfandiĝis en la “Milana Esperantista Rondo”. Samjare Milano gastigis la kvaran esperantistan nacian kongreson, kun signifa partopreno de katolikoj, socialistoj, anarkiistoj kaj sekvantoj de aliaj ideologioj. La ĉefepiskopo, kardinalo Ferrari, estis jam antaŭe sendinta al la grupo koran saluton, dum d-ro Angelo Filippetti, kiu iĝos poste socialista urbestro, aktive partoprenis la kongreson. La sukceso de la manifestacio kaj la interesiĝo de la aŭtoritatoj kaŭzis, ke Milano estis elektita kiel sidejo de la Itala Esperanto-Federacio.

Un giudizio positivo sulla possibilità che una lingua internazionale possa favorire la pace e la reciproca conoscenza tra i popoli fu espresso nel 1914 anche da Roberto Ardigò, professore di filosofia a Padova dal 1881 al 1920, in una lettera al gruppo esperantista padovano che gli aveva chiesto un parere sull'utilità di una lingua internazionale.

Milano era in quegli anni particolarmente favorevole all'esperanto: il gruppo era stato fondato già nel dicembre 1906 con il nome "Milana grupo pro Esperanto", faceva propaganda e istituiva corsi, e la prima lezione di un corso tenuto al Circolo Filologico vide la presenza di 900 persone. Nel 1911 nacque a Milano il "Consolato esperantista per le università italiane" fondato dallo studente Pier Carlo Monti di Pavia, con la collaborazione dei fratelli Pietro e Rinaldo Padulli di Milano e Aldo Schmucker di Genova. Nel 1913 i due gruppi si fusero nel "Circolo Esperantista Milanese". Nello stesso anno Milano ospitò il quarto congresso esperantista nazionale, con una partecipazione significativa di cattolici, socialisti, anarchici e seguaci di altre correnti ideologiche. L'arcivescovo cardinale Ferrari aveva precedentemente inviato al gruppo un caloroso saluto, mentre il dott. Angelo Filippetti, futuro sindaco socialista, prese parte attiva al congresso. Il successo della manifestazione e l'interessamento delle autorità fecero sì che Milano fu scelta come sede della Federazione Esperantista Italiana.

Post la halto de ĉiuj aktivadoj ŝuldita al la milito, en Milano rekomenciĝis la aktivado de la grupo kun informaj prelegoj kaj lingvaj kursoj. Simpatia iniciato estis la starigo de “Esperanta Domo”, kun sidejo ĉe la elementa lernejo de Via Spiga, disponigita de la Komunumo; inter la iniciatintoj estis Angelo Filippetti, kiu estis elektita ĝia prezidanto. En tiu “Esperanta Domo” havis la sidejon la Itala Esperanto-Federacio kaj la Esperanto-Instituto por regiono Lombardio. Ne longe poste Angelo Filippetti estis elektita urbestro de Milano kaj li enkondukis la studon de Esperanto en la 5^a kaj 6^a elementa klaso; ankoraŭ dum lia mandato estis inaŭgurita iu “Via Zamenhof”, kiu, post dumtempa ŝanĝo de nomo volita de la faŝista reĝimo, kiu celis forigi nomon de hebreo, ekzistas ankoraŭ nun, apud “Via Angelo Filippetti”.

En la jaroj de ni traktataj esperantistaj grupoj de maldekstruloj havis intensan agadon en nordokcidenta Italio. Ankoraŭ en Milano en 1923 aktivas la Proleta Esperanto-Grupo; fakte *Sennacieca Revuo*, periodaĵo de SAT, en la numero de julio 1923 donas la sekvan informon:

Milano: La loka Proleta Esperanto-Grupo malfermis novan kurson. Aliĝis 70 personoj; efektive partoprenas proksimume 55, el kiuj nur deko estis partopreninta la unuan kurson. Instruas, tre bone, kamarado Virgilio Bellone. La Grupo daŭre kunvenas ĉiumerkrede kaj

Dopo la sospensione di tutte le attività dovuta alla guerra, a Milano riprese l'attività del gruppo con conferenze informative e corsi di esperanto. Una simpatica iniziativa fu l'istituzione della "Esperanta Domo" (Casa dell'Esperanto), con sede presso la scuola elementare di Via Spiga, messa a disposizione dal Comune; tra gli iniziatori vi fu Angelo Filippetti che ne fu eletto presidente. In tale "Casa dell'Esperanto" ebbero sede la segreteria della Federazione Esperantista Italiana e quella dell'Istituto di Esperanto per la Lombardia. Poco dopo Angelo Filippetti fu eletto sindaco di Milano ed introdusse lo studio dell'esperanto nella 5^a e 6^a classe elementare; ancora durante il suo mandato fu inaugurata una "Via Zamenhof" che, dopo un temporaneo cambio di nome voluto dal regime fascista che voleva espurgare il nome di un ebreo, esiste tuttora, vicino alla via Angelo Filippetti.

Negli anni di cui trattiamo gruppi esperantisti di sinistra ebbero un'attività intensa nell'Italia nord-occidentale. Ancora a Milano nel 1923 è attivo il Gruppo Esperantista Proletario; infatti la rivista *Sennacieca Revuo* (Rivista dell'anazionalità), periodico della SAT, nel n° del luglio 1923 riporta la notizia seguente:

Milano: Il locale Gruppo Esperantista Proletario ha aperto un nuovo corso. Aderenti 70 persone; partecipanti effettivi circa 55, dei quali solo una decina aveva partecipato al primo corso. Insegna, molto bene, il compagno Virgilio Bellone. Il Gruppo continua a riunirsi ogni mercoledì e venerdì, dalle 8,30 alle 10 di

*ĉiuvendrede, vespere de la 8^h, 30 ĝis la 10^h
ĉe la sidejo (Corso Magenta, 15). La fama
esperantisto d-ro P. C. Monti donacis al la
biblioteko de la Grupo multajn valorajn
verkojn en Esperanto; ni esperas, ke
ankaŭ aliaj volos sekvi lian ekzemplon!*

Estas ĉi tie menciita Pier Carlo Monti el Viggiù, doktoriĝinta pri medicino, direktoro de la Itala Esperanto-Instituto, kiu poste kunfandiĝis kun la Itala Esepranto-Katedro fondita de geologo Achille Tellini. Monti estis ankaŭ ŝatata instruisto kaj tradukisto; li verkis gramatikon kaj tradukis al la itala la zamenhofan traktaton “Esenco kaj estonteco de la lingvo internacia” (1931).; li tradukis esperanten rakontojn de De Amicis, la ĉapitron pri la pesto el “La Gefianĉoj” kaj sonetojn de Dante kaj Carducci.

Siaflanke la Laborista Esperanto-Grupo de Ĝenovo eldonis en 1922 la tradukon de “Devoj de la homo” de Mazzini (trad. de Michele Arabeno kun la revizio de Aldo Schmucker, Vicdirektoro de la Liguria Esperanto-Instituto). La unua eldono estis de 10.000 kopioj, distribuitaj en la tuta mondo.

Al Esperanto proksimiĝis ankaŭ la anarkia ideologio. Errico Malatesta (1853-1932), dum multaj jaroj ĉefa aktivulo de la anarkiista movado en Italio, estis lerninta Esperanton dum sia ekzilo en Londono en la unuaj jaroj de la dudeka

sera, presso la sede (Corso Magenta 15). Il famoso esperantista Dr. P. C. Monti ha donato alla biblioteca del Gruppo molte preziose opere in esperanto; speriamo che anche altri vorranno seguire il suo esempio!

È ricordato qui Pier Carlo Monti, di Viggiù, laureatosi in medicina, direttore dell'Istituto Italiano di Esperanto, che poi si fuse con la Cattedra Italiana di Esperanto fondata dal geologo Achille Tellini. Monti fu anche un apprezzato insegnante e traduttore; scrisse una grammatica e tradusse in italiano il trattato di Zamenhof "Essenza e avvenire della lingua internazionale" (1931); tradusse in esperanto racconti di De Amicis, il capitolo sulla peste dai "Promessi Sposi" e sonetti di Dante e di Carducci.

A sua volta il Gruppo Esperantista dei Lavoratori di Genova pubblicò nel 1922 la traduzione dei "Doveri dell'uomo" di Mazzini (tr. Michele Arabeno con la revisione di Aldo Schmucker, Vice-direttore dell'Istituto Ligure di Esperanto). La prima edizione fu in 10.000 copie, distribuite in tutto il mondo.

All'esperanto si avvicinò l'ideologia anarchica; Erico Malatesta (1853-1932), per molti anni esponente del movimento anarchico in Italia, aveva imparato l'esperanto durante il suo esilio a Londra nei primi anni del Novecento e continuò a coltivarlo con letture anche quando tornò in Italia, dove a Milano fondò e diresse il

jarcento; li daŭre praktikis ĝin per legado, ankaŭ kiam li revenis al Italio, kie en Milano li fondis kaj direktis la anarkiistan ĵurnalon *Umanità nuova* (Nova homaro), kiu aperis de 1920 ĝis 1922. Ĝia programo antaŭvidis fratecan rilaton inter ĉiuj popoloj, tre proksiman al la zamenhofa idealo.

quotidiano anarchico *Umanità nuova*, che uscì dal 1920 al 1922. Il suo programma prevedeva un rapporto fraterno tra tutti i popoli, fortemente vicino all'ideale di Zamenhof.

ANDREA MONTAGNER

Antaŭparolo

GRAMSCI KAJ ESPERANTO

Mi volas komenci ĉi tiun mian prezenton piedpinte, ĉar mi konscias pri la graveco de la kolektitaj atestoj, ĉu favore ĉu kontraŭ unu aŭ alia tezo; sed same konscia, eĉ obstine konscia, ke antaŭ ni troviĝas ne du kontraŭstarantaj partioj, sed prefere du partioj kiuj devas ekkoni unu la alian.

Tion mi faras piedpinte rilate al Gramsci, laŭ kies penso formiĝis miloj, ec milionoj da kadroj kaj gekamaradoj de la Komunista Partio, por kiuj la verdikto de Gramsci pri Esperanto starigis kvazaŭ mejloŝtonon, kiu prokrastis la problemon pri internacia interkomunikado ĝis post la “fina venko”.

Tion mi faras piedpinte rilate al Esperanto, kies historio hodiaŭ nepre ne povas egali tion, pri kio Gramsci parolis en sia epoko. Paradokse ankaŭ iuj esperantistoj atendas la “finan venkon”; sed hodiaŭ ni esperantistoj devas redifini la signifon de

ANDREA MONTAGNER

Prefazione

GRAMSCI E L'ESPERANTO

Voglio cominciare questa mia presentazione in punta di piedi, perché sono consapevole della gravità delle testimonianze raccolte, sia a favore che contro una tesi o l'altra, ma altrettanto consapevole e caparbiamente consapevole che non ci troviamo di fronte a due parti contrastanti ma semmai a due parti che devono cominciare a conoscersi.

Lo faccio in punta di piedi nei confronti di Gramsci, sul quale pensiero si sono formati migliaia se non milioni di quadri del Partito e compagne e compagni, per i quali il giudizio di Gramsci sull'Esperanto è stato come la pietra miliare di un "rimandare" il problema della comunicazione internazionale alla "vittoria finale".

Lo faccio in punta di piedi nei confronti dell'Esperanto, la cui storia oggi non può assolutamente essere riconducibile a quello di cui parlava Gramsci a suo tempo. Paradossalmente anche per alcuni esperantisti

“fina venko”, samkiel ni jam delonge redifinis ĝian signifon por maldekstra movado.

Je la du ekstremoj troviĝas nepaciĝemaj konsideroj. Unuaflanke oni esence asertas “ni havas pli gravajn aferojn pri kiuj zorgi”. Aliaflanke oni preferas memreference rekonfirmi sian diferencon por pravigi ian apartiĝon – ankaŭ kiel maldekstruloj – ian tendencon al mondo el rilatoj kaj agoj disigita de la ĉirkaŭa medio. Ambaŭkaze komunikado mankas, kio estas grava eraro por esperantistoj.

Tiutempe Gramsci, kiel evidentigas la lasta eseo de la kolekto, celis akordigi la dialektojn, lingvojn de la popolo, kun la itala lingvo, konsiderata la lingvo de la burĝa klaso, do lingvo trudita de supre. Ni imagu do, kion li povis pensi pri Esperanto!

Mi opinias, ke hodiaŭ la maldekstra penso devus revizii tiun starpunkton, kaj ĉe la lumo de la jarcenta Esperanta historio, kaj ĉe la lumo de la konkretaj postuloj pri lingva rajtegaleco fontantaj el la mondokunvenoj. Mi pensas pri la Mondaj Sociaj Forumoj aŭ pri la Kongresoj de la Socialista Internacio. Koncerne tion, hodiaŭ ankoraŭ validas la rimarkoj de la direktoro de “Avanti”: “En la internaciaj socialistaj kongresoj oni parolas tri lingvojn – germanan, anglan, francan – kaj oni forĵetas horojn kaj horojn por traduki, kaj oni ne interkompreniĝas... kelkfoje”. Se ĝuste hodiaŭ ni vizitas la retpaĝon de la Socialista Internacio, ni konstatas ke la kondiĉoj de la interkomunikado

deve venire una “vittoria finale” ma è altrettanto valido oggi ridefinire cosa vuol dire vittoria finale per noi esperantisti come oggi abbiamo da tempo rivisto cosa vuol dire “vittoria finale” per un Partito della sinistra.

Ai due estremi ci sono considerazioni poco concilianti: da una parte si dice, in sostanza, abbiamo altro a cui pensare. Dall'altra si è così autoreferenziali che si preferisce ribadire la differenza per giustificare una separazione, anche come uomini della sinistra, che è attrazione verso un mondo di relazioni e azioni separato da ciò che ci succede attorno. In entrambi i casi si manca di comunicazione e per un esperantista questo è un peccato grave.

